

Ĉu vi kuiras ĉine?

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 683, 1976-11-10 & 12 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Jen nova libro, kies aŭtoro estas al vi nekonata. Kion vi tuj faras? Vi plej verŝajne rapide tralegas, kion diras pri li la eldonisto. Tion ni faris kun la libro 'Ĉu vi kuiras ĉine?' de Johán Valano, kiun Dansk Esperanto Forlag ĵus eldonis.

A.- Jen kion diras la eldonisto pri tiu Johán Valano:

Cl.- «Esperantisto jam de la infanaj jaroj – kio sendube diferencigas lin de multaj esperanto-verkistoj – Johán Valano suĉis la lakton de diversaj kulturoj. Vera kosmopolito, li vivis en Usono kaj en pluraj landoj eŭropaj, kaj lia laboro por monda organizaĵo kondukis lin al multaj malsimilaj lokoj de Ameriko, Azio kaj Afriko, kaj eĉ al la pacifika insularo. Eble tial lia romano havas ian internacian kaj intersocian atmosferon maloftan en tiaj verkoj, sed aparte ŝatindan por multlanda legantaro.»

A.- Tiujn ĉi sciigojn svisio ne povas tralegi sen tuj alveni al la tikla demando:

Cl.- «Ĉu tiu Valano, tiu kosmopolito, oficisto por mond-organizaĵo, tiu vojaĝanto, tiu psikologo eble ne estus...?»

A.- Silentu! Se li elektis pseŭdonimon, li certe havis bonan kaŭzon por sin kaŝi.

Cl.- Jes, vi pravas. Ĉu ni havas la rajton tuj malkaŝi, kion li volis sekreti? Tamen tiu ĉi krimromano vekas mian detektivan senton. Ĉu Johán Valano ne estus la fondinto de la esperanto-klubo ĉe UN en Nov-Jorko? Ĉu la ŝatata prelegisto, kiu tiel agrable kaj humurplene kaptas nian atenton dum la kulturaj semajnfinoj en Renens parolante pri lingvaj aŭ psikologiaj temoj kaj Johán Valano formas unu solan personon? Ĉu la kanzonisto kaj poeto, la eseisto kaj ĵurnalisto, kies talento estas mondkonata en esperantio - memoru pri La soldato kiu marŝas aperinta en Esperanta Antologio, pri la studo pri suduloj kaj norduloj en Eŭropa Dokumentaro - eksperimentas la romanon ĝenron?

A.- Eble jes? Ni vidu!

Cl.- Ekvorante tiun ĉi krimromanon, librospecon ne oftan en la originala literaturo esperanta, ni tuj malkovris multajn nerefuteblajn konfirmojn al nia antaŭsento. Tra la kanalo de Dansk Esperanto Forlag fakte riĉiĝis la svisa originala literaturo esperantlingva je nova verko, ĉar la aŭtoro de La soldato kiu marŝas, en la vento, en silento, sur la vojo kiu marĉas, kiun Esperanta Antologio prezentas kiel belge naskita en 1931, enradikiĝis en Svislando.

A.- Kelkajn konfirmojn vi atendas. Unue ni menciu la stilon tipe esperantan, agrable legeblan. Kiuj konas la poeton kaj lian edzinon, tiuj tuj rekonos ilin en la ĉefherooj de 'Ĉu vi kuiras ĉine'? La detektivo Jano Karal, tiu sprita observanto pri lingvaj kaj psikologiaj fenomenoj kaj Ĝoja, lia edzino, tiu vigla kaj vere ĝoja virino kunlaborema, jen ilia personigo. Je la paĝo 23-a la frazo «Lejla Gorazdo prezentis la stereotipon de sudulino tiel senmanke, kiel Karina Fisko la nordulinan.» nepre pensigas al ni pri la psikologia eseo pri suduloj kaj norduloj aperinta en Eŭropa Dokumentaro.

Cl.- Sed fine, kiu fakte krimis ? Ĉu la sudulino Lejla Gorazdo aŭ la nordulino Karina Fisk? Aŭ ĉu la aŭtoro Johán Valano? Kaj kiu vere detektivas? Ĉu Jano Karal aŭ ni mem? Katenitaj de la romano, ni ĝin legis per unu gluto - bonega punkto por la aŭtoro - kaj ni komprenis, kial li emis distanciĝi de sia verko. La malforteco de la konkluda parto - io sufiĉe tipa en la esperanta literaturo - atestas, ke la vera celo de la romano estas pli lingva ol krimdetektiva.

A.- Kaj ĝuste, ĉar planlingvistike la krimromano 'Ĉu vi kuiras ĉine?' alportas ion ege interesan kaj eble novan, la aŭtoro sentis la bezonon sin kaŝi malantaŭ pseŭdonimo. En la esperanta socio lingva eksperimento estas nepardoninda peko.

Cl.- Kio estas la peko de Johán Valano? - Aparteni al la sanktavala socio: En Sanktavallo oni parolas dialekton, kiun oni instruas en la lernejoj. Ni citas:

A.- «En la sanktavalanaj lernejoj, oni instruas al la infanoj de tempo al tempo forigi la finan 'o' de substantivo, por eviti monotonecon, aŭ kiam la ritmo de la frazo tion pravigas. Neniu sanktavalano skribus leteron lasante ĉiujn o-finaĵojn. Sed anstataŭ uzi apostrofon, oni tie metas dekstrakornan supersignon sur la lastan vokalon de l'vorto kiel en la hispana.» Jen kiel ekzemple parolas doktoro Gutmanis:

Cl.- «Fakte lia kór estis tute sana. Temas pri viro psike nestabila, kun impresiĝa karaktero. Temas pri longeta gelatena kapsulo, ne pri gutoj aŭ pulvoro, kiun oni metus en trinkaĵon. Se iu forprenus la pulvoron el la kapsulo por ĝin miksi kun manĝo.»

A.- Vi komprenis, Johán Valano, kaj ne Johano Valano, ne estas vera esperantisto. Kun la tuta loĝantaro de Sanktavallo li praktikas dialekton. Jen la lingva peko de Johán Valano! Jen la sekreto de la pseŭdonimo. Kaŝnomo por publikigi malortodoksan lingvosintenon.

Cl.- Ni reparolos pri tiu plurflanke interesa libro.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!